



ESPERANTO

NORMANDA BULTENO

unuigo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 7,62 Eŭroj Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

PAROLOJ DE RESPUBLIKESTROJ

Antaŭ voĉdonado, la kandidato Jacques CHIRAC respondis al Vincent Charlot la 5an de Aprilo 2002

Cher Monsieur,

Vous avez bien voulu attirer mon attention sur le problème de l'Espéranto et je vous en remercie car, comme vous le savez déjà, il s'agit d'une cause à laquelle je suis sincèrement favorable.

Même si pour des raisons que vous comprendriez aisément, je souhaite avant tout me consacrer à la défense de la francophonie, j'éprouve une sympathie profonde pour l'espéranto et le projet humaniste qui a présidé à sa création et qui anime plus que jamais ses défenseurs aujourd'hui.

J'estime pour ma part que la progression de l'Espéranto, dans le respect de la diversité culturelle qui lui est consubstantiel, serait un facteur puissant d'harmonie et de compréhension entre les peuples.

Il ne fait aucun doute que, si le sort des urnes m'est favorable, je soumettrai au prochain gouvernement, et au ministre de l'Education Nationale en particulier, la question de son inclusion comme option au baccalauréat, notamment au regard des souhaits exprimés par les élèves et parents, et de la possibilité de recruter suffisamment d'examinateurs compétents.

Je vous prie de croire, cher Monsieur, à l'expression de mes sentiments les meilleurs

Bien cordialement

Jacques CHIRAC

Sed.... la 13an de Aprilo 1981, François Mitterrand skribis al Henri Masson, Ĝenerala Sekretario de SAT Amikaro:

Monsieur le Secrétaire Général,

Je vous remercie vivement de la lettre que vous m'avez adressée et que j'ai lue avec attention.

Je me permets de vous préciser que mes amis parlementaires ont déposé lors de la précédente session de l'Assemblée Nationale une proposition de loi tendant à inclure la langue internationale Esperanto dans l'enseignement secondaire et l'enseignement supérieur comme langue à option.

Si les Français m'accordent leur confiance, je demanderai au Gouvernement de soumettre au Parlement cette proposition de loi.

En espérant avoir ainsi répondu à votre question, je vous prie de croire, Monsieur le Secrétaire Général, à l'assurance de mes sentiments distingués.

François MITTERRAND

Esperantistoj estas feliĉaj kiam decidpovaj eminentuloj subtenas nian aferon. Pli feliĉaj ili estas kiam promesoj estas efektivigitaj. Do ...ni esperu!....

KIAL KAJ KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO ?

Tio estis la titolo de artikolo verkita de Pierre Pottier en la junia numero. Tio donis ideon al aliaj por atesti pri sia esperantistigo (kaj esperantisteco). Eble, ĝi estas komenco de serio. Ni do atendas viajn atestojn.

Mi estis tridekkvin jaraĝa manlaboristo. Pro granda alkutimiĝo, mi ne bezonis multe cerbumi pri mia metio kaj mi konstatis ke mia cerbo estis malvigliganta !

Mi estis naturisto kaj regule ĉeestis naturistajn kunvenojn en la urba naĝejo. Iun tagon, alia fidelulo pruntedonis al mi malnovajn revuojn "La vivo je la suno" (oficiala organo de la nacia naturista organizo). En tiuj monataj revuoj, mi legis malgrandajn artikolojn kiuj priskribis elementojn de esperanta gramatiko. Mi, kiu ĉiam havis malfacilaĵojn kun franca ortografio trovis tion tre interesa. Tiu lingvo taŭgis al mia intelekta strukturo ! Kaj ,pro tio ke mia cerbo estis bezonanta ekzercadon, mi tuj decidis eklerni Esperanton !

Mi vizitis librovendejon kaj petis pri esperanta libro. La maljuna vendistino respondis: "Ho ! Mi opinias ke mi havas ion por plenumi vian deziron" Ŝi serĉis en vastega tirkesto kaj eliris tute malgrandan ruĝan libreton notitan per la antaŭmilita prezo de unu franko kaj sepdek-kvin centimoj ! Tio estis mia unua kontakto kun Esperanto ! Mi parkere studis tiun libron sed tio ne sufiĉis al mia lerndeziro ! Je la lasta paĝo de la broŝureto, estis adreso : Mi skribis kaj venigis "Esperanto vivant" de Sinjoro Delaire kaj "Tra la mondo" kun diskoj !

Du jarojn poste, (en 1970, mi kredas) , mi iris al Grezjono por festi la dudekan datrevenon de la Kultura Centro.

Venis oficialuloj kaj diversnaciaj ĉeestantoj. Mia kapo estis bolanta ĉar estis mia unua praktika kontakto kun Esperantujo ! Dum kelkaj tagoj, mi multe progresis. Mi estis adoptita de grupo da dekduo da Germanoj el Hamburgo kiuj (parenteze dirite) multe ŝatis kalvadoson kaj kolbasojn ! Iu el ili, Enriko Wielgus ĉiumatene estis fiŝkaptanta en la lageto, sed kiam li sukcesis fiŝkapti, li ĉiam reĵetis la fiŝetojn en la akvon ! Kiam mi naive demandis "kial ?" li respondis: "Se mi ne agus tiele, morgaŭ, mi ne plu trovus fiŝetojn kaptendajn" !

Poste mi kontaktis la grupon en Le Havre. Mi ofte aŭskultis la radion: Pekino, Berno, Vatikano, Vieno kaj precipe Varsovio kiu (malgraŭ ne tre klara ricevado) vere instruis al mi la praktikadon de la lingvo !

Pli poste, mi instruis la lingvon en la junularkulturdomo. Kompreneble, mi korespondis kaj mi ĉeestis la centjaran kongreson en Varsovio kies mi konservas neforgeseblan memoraĵon ! Mi skribis grandan raporton pri tio Sed mi estas ĉefe hejmorestemulo kaj mi tute ne ŝatas vojaĝi: do, mi malmulte uzas Esperanton. Tamen, mi tute ne bedaŭras la lernadon de la lingvo kaj plezure uzas ĝin!

Por kompari : mi studis la anglan dum pluraj jaroj; mi sekvis apartajn kursojn kaj vesperajn kursojn (kiam mi estis plenkreskulo). Iun tagon, mi aŭskultis anglajn essendojn de "Radio 4": mi nenion komprenis. Do mi denove studis kursojn per diskoj : "Reader's Digest" kaj "English without toil". Poste, mi reprovigis aŭskultadon de "Radio 4" kaj mi ne komprenis pli ol la unuan fojon ! Tamen mi sukcesas sufiĉe facile la legadon de angla lingvo. Sed priatentante la centojn da horoj de lernado, mi ne povas diri ke tio estas sukceso kompare al Esperanto kiun mi lernis sola kaj tiel multe pli rapide !

Alano Šalm
Grupo de Le Havre

Niaj geamikoj el malalta Saksio legas nian bultenon kaj sendas al ni sian organon "Esperanto en Niedersachsen" Jen atesto de Klaus kiu loĝas en Laatzen apud Hannover

Kial Esperanto?

Januaro 1949 en Flensburg, la plej norda urbo de Germanio. Mi estis 15jara. En la lernejo ni lernis la latinan kaj la anglan lingvojn; posttagemeze kaj libervole mi partoprenis kursojn por la dana kaj la hispana. Tio estis lingvoj, kiujn ankaŭ komprenis niaj instruistoj. Kelkaj klaskamaradoj tiam kunsidis por serĉi sekretan lingvon, kiun neniuj instruistoj komprenu!

Hazarde mi renkontis Esperanton: domo en nia najbareco portis la enskribon "Esperanto-Informejo". Duona dozeno de klaskamaradoj tie komencis partopreni kurson. Bedaŭrinde ĉiujfoje aperis malpli, kaj fine mi estis la sola el mia klaso. Kiel sekreta lingvo inter grupo de lernejoj Esperanto tial bedaŭrinde ne sukcesis.

Des pli ĝi utilis al mi persone: la jaron poste, en la someraj ferioj, mi povis partopreni al "Arkeologia Tendaro" en Danlando, kie studentoj kaj lernejoj povis kunhelpi elfosi vilaĝon el la vikinga epoko. Mi estis la sola germano inter tendaranoj el 7 landoj. Ĉar Esperanto estis la sola komuna lingvo de ĉiuj, mi finlernis ĝin perfekte dum unu monato.

Tiam vojaĝoj al eksterlando estis por germanoj nur eblaj post persona invito de privatuloj aŭ institucioj, kaj tiujn mi povis facile havigi al mi per Esperanto. Tiel mi konatiĝis, danke al Esperanto, ĝis la abiturienta ekzameno kun multaj interesaj homoj en duona Europo - kelkajn el tiuj kontaktoj mi flegas ankoraŭ hodiaŭ.

d-ro Klaus Schlüter
Laatzen, Germanio

ADIAŬ JOHANO

Nia amiko Jean GIBAUx forlasis nin.

Ni eksciis dum monato Junio ke li estis trafita de hemiplegia krizo; li fariĝis duonparalizita senparolkapableco. Li multe suferis fizike kaj spirite pro tiu malsano ne kuracebla. Tia li restadis ĝis pligraviĝo de lia sanstato kaj forpaso.

Johano estis pioniro de nia normanda unuiĝo kiu celas regroupigi ĉiujn diverstendencajn esperantistojn. Tamen, li aktivis por siaj ideoj kaj estis fervora aktivulo de laborista movado kaj fidela membro de SAT. Tiuj kiuj partoprenis SAT-Amikaran kongreson en Hérouville memoras kiel gaja kaj feliĉa li estis kiam li animis la distran vesperon kun la grupo Kajto.

Ĝis vivfino, li restis sindonema, bonhumora kaj entuziasma aktivulo.

Dankon Johano pro la laboro farita; aliaj daŭrigos cian batalon por amikeco, paco kaj Esperanto!

Por U.N.E.

Petro KJO

Tristigo por Havra grupo:

Nia amiko Johano GIBAUx forpasis la 23an de Septembro 2002. Lia forpaso multe kortuŝis nian samideanan komunumon.

Li malkovris Internacian Lingvon dum 1936 okaze de vizito de Lidja Zamenhof. Li konsciis pri bezono de komuna interkomprenigilo dum teruraj tempoj de 2a mondmilito. Kiam revenis la tiom atendata paco, je la unua kursanono, Johano sin "Jetis" en la studadon de tiu mirinda Esperanto. Baldaŭ, li kontaktis la esperantistojn en Le Havre kaj kune, ili vekigis kreante novan asocion.

Depost 25 jaroj, li estis respondeculo en la Havra Esperantista Komitato, li poste helpis novan generacion por antaŭenirigi nian aferon dank'al sia lerta sperteco. Ankaŭ, li estis dumviva membro de U.E.A. kaj de longe havis oficon en Delegita Reto.

Li konstante alportis la saman sindonemon, la saman entuziasmon por gardi esperantistan senton. Li efektivigis eksterlandajn rilatojn: ĝemeligo kun Sankta Peterburgo (1972), kun Southampton (1973). Li iniciis regulajn kontaktojn kun Dalian (Ĉinio) dank'al intersaĝo de universitatoj.

Lia "kariero" estis ligita kun historio de nia asocio. Tiu sincera samideano estis ĝia memoratestanto.

Adiaŭ amiko Johano, ni ne forgesos vin.

Al lia edzino Yvette, liaj gefiloj kaj genepoj, ni prezentas sincerajn kondolencojn.

Sylvie CARON

Havra grupo

NIA REGIONO:

Mi ne ricevis informojn kaj komunikaĵojn pri aktivaĵoj de grupoj kaj de izoluloj. Mi atendas ilin por la decembra numero.

Hérouville preparas rondvoĵon de rusa verkisto Miĥaelo Bronŝtajn dum monato Januaro. Grupoj kaj izoluloj kiuj deziras organizi prelegon (kun traduko por neesperantista publiko), bonvolu tuj kontakti nian prezidanton Yves NICOLAS 17/37 Quartier du Bois 14200 Hérouville Saint Clair

ROUEN: Catherine Domingo gvidos kurson en librovendejo "l'Insoumise".

KOTIZOJ -ABONOJ: Multaj membroj ne sendis sian abonkotizon por 2002.

Bonvolu legi la ĉi-suban liston. Se via nomo ne aperas sur tiu listo, tio signifas ke vi ne sendis vian monan kontribuon por daŭrigi nian bultenon.

LISTE DES ADHERENTS qui ont réglé leur abonnement 2002:

Gesinoroj Bachimont, Bataille, Bessière, Boudet, Canu, Caron, Chalm, Colombel, Corrieu, Demmer, Domingo, Dubois, Duflo, Dufossé, Dufresne, Esp-Cotentin, Erhard, Evrard, Frelon, Gibaux, Gibert, Gueroult, Guerre, Guilmot, Haulard, Helbert, Huet, Jourdain M.L., Jourdain D., Jouvin, Lamy, Langanay, Lebrun, Lecouvreur, Legros, Leguillon-decosse, Lehericey, Lemarchand, Lemenager, Lévesque, Leroy, Lesueur, Loisel, Loupiac, Magerel, Marie F., Mary P., Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Paris, Paumier, Pilet, Pottier, Quillaud, Rauch, Robiollé, Rolland, Séry, Tailpied, Tanguy, Turmel, Zilliox

Si votre nom ne figure pas dans la liste ci-dessus, n'attendez pas pour nous envoyer votre contribution. Pour compenser votre retard, nous accepterons bien volontiers et d'avance votre cotisation 2003 ! Epargnez nous de devoir vous rayer de notre liste ou alors prévenez nous que notre bulletin ne vous intéresse pas

ASSEMBLEE GENERALE: Aucun groupe ne s'est encore manifesté pour organiser la réunion générale que nous imposent les statuts de notre association. Une convocation vous sera adressée dès que cela sera possible.

UNIVERSALA KONGRESO

La Universala Kongreso okazis de la 3a ĝis la 10a de Aŭgusto en Fortaleza, en Brazilio.

Ĝi estas la plej impona esperantista manifestacio en la mondo.

Ĝi kunigis 1484 homojn el 58 landoj. Bedaŭrinde neniu Normando ĝin partoprenis; pro tio ni ne povas aperigi impresojn kaj komentojn de samprovincanoj.

La 88a Universala Kongreso okazos de la 26a de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto 2003 en Göteborg (Svedio)

En Sangatte, rifuĝintoj serĉas azilon

Jen la titolo de artikolo de Suzanne Helbert kiu aperis sur la 5a paĝo de nia bulteno de Junio 2002. Tiu artikolo ne estis partianeca, sed precipe informa: geografia situo de la rifuĝejo; administrado; nombro, deveno kaj motivoj de tiuj homoj; kial ili volas iri en Anglion? (lingvo, anglaj leĝoj, asocioj); nunaj rezervoj de Britoj kiuj timas invadon; akcidentoj, etoso en la centro.... Suzanne aldonis kiel konkludo la lastan frazon kaj linion: "Urĝas ke politika volo de ĉiuj landoj en Eŭropa Unuiĝo manifestiĝu por trovi humanistajn kaj realistajn solvojn"

Tiu lasta frazo donis pretekston al Henri Rousseau por verki ĉi suban artikolon kiu estas partieca kaj entenas ideojn kiuj malplaĉas al kelkaj.

Mi do ripetas kion mi jam skribis: ni evitu polemikecajn artikolojn en nia neŭtrala ligilo

Mi ne aperigos aliajn artikolojn pri tiu temo.

La redaktanto

Kvankam verŝajne tiu bulteno ne estas la taŭga loko por tiu tikla temospoko, mi ŝatus respondi al la artikolo kiun aperigis mia rilate esperanto samideanino Suzanne Helbert, en nia normanda ligilo de Junio 2002, pri la Sangatte gastocentro por eksterleĝaj fremduloj.

Jes ja, niaj teneraj koroj povas emociiĝi antaŭ homsuferado. Sed akcepti la suferantojn en la Eŭropaj landoj ne estas la solvo de ilia problemoj: eĉ se ni akceptus nian submerĝigon, la demografia kresko de la "sudaj" landoj (1) ilia manko de ekonomia disvolviĝemo, ilia emo solvi siajn problemojn per internaj militoj, kaj kelkaj aliaj bremsigaj karakterizoj, kondukus al jeno: 1) la mizero ne malaperus en la sudaj landoj kiuj daŭre naskus ĉiujare milionope suferantojn, kaj ne tuŝus al la kaŭzoj de sia nuna malbona stato; 2) la sama mizero aperus ĉe ni post 50 jaroj kun la nuna ritmo de enmigrado, kiam nia loĝantaro ankaŭ estus fariĝinta "suda"; 3) Eŭropo fariĝinta nur geografia nomo, ne plu estus tie por fine efike helpi ek-sinhelpantajn ek-komprenintojn.

Jes ja ni kompatu la Kurdojn kiuj ne havas sian propran ŝtaton; despli kialo por konservi la nian. Ili fiere kapablis konservi sian fortan personecon sub la fortaj Turkoj, Irakanoj kaj Irananoj; ĉu estus saĝa esperi ke ili rezignos pri ĝi inter ni, milduloj kaj kulpobatemuloj?

Mi opinias ke la solvo kuŝas en la enmana preno de siaj destinoj fare de la suferantaj popoloj; ni povas ilin helpi tiel: 1) ne nin akuzante pri la respondeco de ilia bedaŭrinda stato, 2) montrante al ili ke disvolviĝo estas la rezulto de jarcentoj de laboro, korpa kaj intelekta, de la suferado de generacioj, de oferoj; nia vojo ne estis (kaj plue ne estas) kovrita de rozpetaloj, 3) dirante al ili la fekundajn, konstruivajn veraĵojn ke laboro, toleremo, honesteco, disciplino, estas la kondiĉoj de la progreso kaj, 4) se ili sin helpas, ni povos ilin helpi.

Jen la "humanista kaj realista solvo" kiun, laŭ la konsilo de nia amikino, la Eŭropaj landoj povus proponi. Aliamaniere, oni povus unu plian fojon akuzi Eŭropon okupiĝi pri kio ne koncernas ĝin

Henri ROUSSEAU

(1) En 1900, la planedloĝantaro estis unu miliardo da homoj; en 2000, ĝi estis ses miliardoj. Dum la sama jarcento, Francio, ekzemple multiplikis sian loĝantaron per nur 1,5 (de 40 milionoj al 60)

POUR LA LIBERTE DE VIVRE EN FRANCAIS

La commission de l'Europe entend interdire à la France d'étiqueter en français les produits alimentaires a-t-on appris le 27 Juillet dans Le Figaro et sur l'AFP, avant que l'information ne soit reprise le 28/7 au JT de TF1

Une mesure de plus à inscrire dans une longue suite de décisions visant à marginaliser ou à exclure l'usage du français, non seulement en Europe mais désormais aussi en France.

VOX LATINA lance une pétition: "Pour la liberté de vivre en français" qui sera adressée aux autorités françaises et européennes

Vivre en français@voxlatina.com

"Bien placée pour savoir ce qui se passe réellement, Mme Campogrande, fonctionnaire de la Commission Européenne préposée aux relations avec les Pays Tiers, déclare ouvertement que "l'Europe fait l'objet d'une stratégie d'encerclement linguistique et culturel mise en place, depuis des décennies, à des fins essentiellement économiques et commerciales, où rien n'a été négligé."



LE CONGRES DE SAT 2002

Du 1^{er} au 7 juillet a eu lieu le 75^e congrès de SAT à Alicante (Espagne) avec un pré-congrès les 28, 29 et 30 juin.

Quelque temps avant la date, pourtant inscrite depuis plusieurs mois sur mon agenda, je n'avais plus l'intention de participer : tout semblait mal se dérouler, y compris avec la réservation de mon billet de train. J'avais aussi le sentiment désagréable de me « traîner » dans l'acquisition de la langue, résultat de ne pas m'être imposé un apprentissage régulier !... Et puis, ce petit coup de déprime passé, il me restait quand même assez d'énergie, donc : « En route pour l'aventure ! ».

Si l'espéranto permet de se comprendre effectivement, il n'en est pas de même hélas avec les habitants des pays organisateurs de congrès. S'agissant de l'Espagne, la difficulté est moindre, et le voyage _ fractionné _ a pu se dérouler normalement.

Le lieu : l'université d'Alicante, propice pour ce genre de rencontre, excentrée de quelque cinq kilomètres, offre toutes les installations nécessaires, assortie cependant d'une interdiction de faire une quelconque publicité, pas même un fléchage.

Un tiers des participants environ était présent pour le début de l'avant congrès. Une difficulté pour les organisateurs car, malgré les promesses, les chambres n'étaient pas toutes libres puisque l'année scolaire se termine le 30 juin.

Dès le matin du samedi, départ en car pour la visite de Valencia distante de quelque 150 kilomètres. Deux guides espérantistes nous attendent à l'arrivée. Distribution de documentation, visite de la Tour de la Sierra (gratuite), visite de la ville ancienne avec musées, crypte, palais et vieux marché. Un regard ici, une photo par là et des explications à chaque fois que c'est nécessaire. Un arrêt dans un café afin de goûter une production locale : horchata liquida ou granizado... ou autre boisson.

Le déjeuner au bord de la mer en une seule (grande) tablée et les courants d'air du lieu nous font oublier pour un temps les 36° du moment. L'après-midi nous réservait une promenade en barque à moteur dans un site protégé de 16 ha. Ceux qui n'ont pas pu prendre place dans les première et deuxième embarcations se retrouveront avec les mariés du jour ! Puis c'est la visite du très moderne musée des Arts et des Sciences : prouesse de techniques architecturales dignes des cathédrales d'antan.

Le temps des repas est plus que jamais l'occasion des bavardages. Avec 137 participants (dont 64 Français) et 17 pays différents, on parle, on "krokrodilas" même, on voudrait refaire le monde... On reste songeur quand on apprend que telle personnalité espérantiste ne croit pas à l'avenir (au moins européen) de la langue ; on applaudit à l'idée d'un projet de candidat aux prochaines élections européennes (pour faire connaître le mouvement) ; on désespère lorsque l'on constate que certains groupes se trouvent bien dans leur cocon et ne semblent pas souhaiter autre chose ; on reste rêveur devant une belle lettre de candidat alors que l'on cherche ce qui a été fait des promesses précédentes...

Dimanche matin le ciel est sombre et le sol est mouillé : on pense qu'il fait toujours beau sous cette latitude et pourtant... Visite d'Alicante et baignade pour les plus courageux (il est vrai que l'eau est à 26° C). On a pu remarquer les allées avec la recherche dans les motifs des payages (cubes ou vagues) que ne dédaignent pas les vendeurs à la sauvette. Profitant de temps libre, cet après-midi-là, avec un Anglais, je ferai une promenade de quelque trois heures le long de la plage. Et ce soir-là, il pleuvra.

Le lundi, c'est l'arrivée, l'inscription et la remise de documents, l'attribution des chambres, les retrouvailles... J'ai un petit problème de lieu de couchage entre hôtel en ville et chambre à l'université, mais le soir ce sera réglé. Etant sur les lieux, ce sera : « j'y suis, j'y reste ». Dans l'après-midi, un car nous emmène pour visiter la ville et notamment le château.

Mardi, c'était l'ouverture solennelle et officielle de ce congrès, dans le château Sankta Barbara, avec photos, discours, présentation des divers pays, vin d'honneur substantiel. L'après-midi notamment fut présenté le nouveau PIV, et des groupes en profitaient pour tenir leur réunion annuelle. Le soir, après une présentation de Zofia Banet, Jerzy Fornal présenta un spectacle digne des meilleurs artistes. Dommage qu'un contretemps n'ait pas permis de rassembler plus de monde, mais c'est avec plaisir que nous les reverrons de nouveau à un autre moment.

Ce qui a marqué le mercredi : une réunion générale de travail le matin et une excursion à Elche l'après-midi (musée de la festa aux coutumes religieuses), visite du musée de l'Archéologie (période avant J.-C), église, vestiges de bains arabes. Puis visite de la palmeraie, patrimoine de l'humanité, diversité des palmiers, des oiseaux, orangers et citronniers portant encore de beaux fruits...

Jeudi : matinée de travail, l'après-midi étant plus réservé aux personnes s'entretenant de thèmes variés, dont notamment Zofia au sujet de la famille Zamenhof.

Vendredi, deux cars pour une excursion de toute la journée : visite d'une grotte avec belles concrétions anciennes à Cannalobre ; Guadalest, un des villages les plus visités de la région ; Benidorm, la mer d'un côté, la forêt d'immeubles de l'autre, avec sur la plage beaucoup plus de personnes recherchant le bronzage que le contact de l'eau).

Samedi, matinée de travail. Ceux qui se sentent à l'aise sur internet peuvent surfer... ou interroger leur boîte à lettres. En fin d'après-midi, ce que l'on n'oubliera pas, un spectacle de danses folkloriques riches en couleurs et musique, par des groupes costumés à la façon locale.

Dimanche, matinée toujours favorable au travail mais c'est aussi la fermeture officielle du congrès avec l'exposé de la Résolution présentée sur tableau géant grâce à l'informatique. Présentation du 76^e congrès de SAT à ^{LA CHaux}_{DE FONDS} (Svissio). Les derniers achats au Libroservo... et aussi les premiers départs.

En guise d'anecdote : ce dimanche soir, au dîner, un participant parle incidemment d'abeilles. Je tends l'oreille puis je le rejoins un peu plus tard avec le dernier Normanda Bulteno à la main. Je lui explique que je ne suis pas apiculteur mais que j'ai écrit cependant un article sur les abeilles. Nous nous retrouvons à trois (avec un autre anglophone) au bar, autour d'une table, et pendant une bonne partie de la soirée, discutant sur le texte et les mots employés et sur la vie des abeilles, les maladies, la réglementation _ bien sûr très différente en Australie _ l'Anglais de Londres se montrant très intéressé par le sujet et posant des questions dont, parfois, la précision sera obtenue en anglais entre eux !

Lundi, le retour... Partir, c'est mourir un peu, dit-on... Il faut noter que l'équipe organisatrice _ peu nombreuse mais active _ a permis un bon déroulement de ce rassemblement.

LE ROY.
Dominique